Mohr C. O. (1947): Table of equivalent populations of North American small mammals. American Midland Naturalist 37:223-249.

Moll E.O. & J.M. Legler (1971): The life history of a neotropical Slider Turtle, *Pseudemys scripta* (Schoepf) in Panama. –Bulletin of the Natural History Museum of Los Angeles County 11: 1-102.

Naulleau G. (1992): Study of terrestrial activity and aestivation in *Emys orbicularis* (Reptilia: Chelonia) using telemetry. En: Korsos, Z. & I. Kiss (red.): Proceedings of the 6th Ordinary General Meeting of the Societas Europaea Herpetologica (SEH), Budapest: 343-346.

Podloucky R. (1981): Zur Situation der Amphibien und Reptilien in Niedersachsen: Die Europäische Sumpfschildkröte (Emys orbicularis). Niedersächsisches Landesverwaltungsamt Hannover (eld.), Informationsdienst Naturschutz 2:1-8.

Rovero F. & G. Chelazzi (1996): Nesting migrations in a population of the European pond turtle *Emys orbicularis* (L.) (Chelonia Emydidae) from central Italy. – Ethology, Ecology & Evolution 8: 297-304.

Ŝĉerbak N. N. (1998): The European pond turtle (*Emys orbicularis*) in Ukraine. En: Fritz, U., U. Joger, R. Podloucky & J. Servan (Hrsg.): Proceedings of the EMYS Symposium Dresden 96. – Mertensiella 10: 259-266.

Schneeweiss N., B. Andreas & N. Jendretzke (1998): Reproductive ecology data of the European pond turtle (*Emys o. orbicularis*) in Brandenburg, Northeast Germany. *en*: Fritz, U., U. Joger, R. Podloucky & J. Servan (Hrsg.): Proceedings of the EMYS Symposium Dresden 96. – Mertensiella 10: 227-234.

Servan J. (1986): Utilisation d'un nouveau piège pour l'étude des populations de Cistude d'Europe *Emys orbicularis* (Reptilia: Testudines). – Revue d'Ecologie (la Terre et la Vie) 41: 111-117.

Servan J. (1998): Ecological study of *Emys orbicularis* in Brenne (Central France). En: Fritz, U., U. Joger, R. Podloucky & J. Servan (red.): Proceedings of the EMYS Symposium Dresden 96. – Mertensiella 10: 245-252.

White G.C. & R.A. Garrott (1990): Analysis of Wildlife Radio-Tracking Data. – San Diego, New York, Boston (Academic Press, Inc.).

Zemanek M. (1988): Składanie jaj przez zółwie błotne, *Emys orbicularis* (L.), w Polsce Środkowej w warunkach naturalnych. – Przegląd Zoologiczny 32/3: 405-417.

Adresoj de la aŭtoroj

D-rino Martina Meeske, S-ro K. J. Rybczyński
Zentrum für Naturschutz der Universität, Von-Siebold-Strasse 2
DE – 37077 Göttingen / GERMANIO <k.rybczynski@gmx.net>

Priaŭtoraj informoj

S-ino *Meeske* diplomiĝis pri zoologio ĉe la universitato *Göttingen* kaj doktoriĝis ĉe la Instituto pri Ekologio kaj Evolubiologio ĉe la Universitato *Bremen*, Germanio. S-ro *Rybczyński* magistriĝis pri zoologio ĉe Universitato *Poznań*, Pollando, kaj nuntempe kolektas materialon de surkampe vivantaj best(et)oj, kiuj estas minacataj de ĥemiaĵoj uzataj dum kampkulturado en la Harcmontaro, Germanio, kaj en vinberejoj de la Burgonio, Francio.

La romia imperiestro Konstanteno la Granda kaj la kristanismo

Gerhard Kalkhof (†)

1. Junaĝo kaj ascendo al potenco

Kio kaŭzis la kolapson de la tetrarkio, sagace elpensita? La adopta tronsekvo, de Cezaro Aŭgusto enkondukita kaj de Diokleciano renovigita, celanta ke regu la plej lertaj kaj plej noblaj politikuloj, trakruciĝis de la ĝenerale uzata heredsekvo inter patro kaj filo. Ĝi pruviĝis pli forta ol la diokleciana tetrarkio, kiam post la morto de aŭgusto-imperiestro *Constantius* en la jaro 306 lia filo Konstanteno ne sekvis kiel aŭgusto – sed al "aŭgusto" nomumis lin liaj armeoj en Gallio kaj en Britujo. Kio ĉirkaŭvolvas evente aŭ eĉ dekorante tiujn imperiestrajn personojn: la patron *Constantius* kaj lian filon Konstanteno?

Constantius I. Chlorus (t.e. "pala") originis el kampara familio (naskita en Ilirio, ĉ. 250), karieris kiel soldato ĝis "tetrarko", do cezaro, nomumita "aŭgusto" de *Maximianus*, kiu estis lia bopatro, ĉar kun ties filino *Theodora* li edziĝis. Multe de sia tempo li pasigis en Gallio kaj Britujo, iutempe rezidante en la okcidenta metropolo *Augusta Treverorum* (Treviro) en la nuna Germanujo. Li ascendis al "Aŭgusto" (*G. Flavius Valerius Constantius*) post la demisio de Diokleciano (305) kaj *Maximianus*, nomumante adopte la cezaron *Severus* (*Flavius Valerius Severus*), kvankam li havis filojn.

Unu el ili, Konstanteno, estis destinita ekesti imperiestro – eble de la sorto, certe de la patro *Constantius* – kaj savi la Romian Imperion. Verŝajne *Constantius* ekkonis la kapablojn de sia filo, kiun li favoris antaŭ la aliaj ses filoj kaj filinoj. Ĉar tiu ne devenis de lia edzino *Theodora*, filino de *Maxentius*, sed de *Helena*, kromvirino, kiu naskis Konstantenon 274 en *Naissus* (nuna *Niš* en Serbio kaj Montenegro).

Eble jen legendo nebulas la historian verecon: laŭ ĝi *Helena*, filino de gastejestro, estis kristanino kaj edukis sian filon en la kristana konfesio, samtempe influante ties patron *Constantius*. Pravas tamen, ke *Constantius* kun sia legitima edzino *Theodora* tre inklinis al la kristanismo; tial li persekutis kaj punis en la jaro 303 la kristanojn nur duonkore.

Malgraŭ ĉio ĉi *Constantius* zorgis, ke lia filo povis montri sin per siaj tutaj braveco kaj eminenteco. Unue tio okazis, kiam Konstanteno akompanis la imperiestron Diokleciano, kiam ribelado en Egiptio devis esti sufokata (296). La juna 22-jara altstatura oficiro impresis pli brile ol Diokleciano. Tamen, ofte kaj ripete, la aŭgusto Diokleciano restadigis lin ĉe sia kortego, kiun li, maljuniĝante, aranĝis en Nikomedio.

Certe Konstanteno elstaris ĉe la imperiestra kortego, verdire lia patro *Constantius* estis cezaro, kaj lin mem ŝatis la legianoj. Multaj el ili strebis, ke la cezarofilo atingu tetrarkian oficon. Sed verŝajne *Galerius*, la alia kuncezaro de lia patro, suspektis lin. Tiel, opiniante la restadon en Nikomedio teda kateno, li strebis de tie foriri.

Aspektis kvazaŭ fuĝo, kiam Konstanteno forlasis la imperiestran kortegon en Nikomedio, post kiam okaze de la rezigno de Diokleciano – kaj de la ascendo de lia patro al "aŭgusto" – li ne fariĝis cezaro: kredeble la patro *Constantius* agis tiamaniere, konsidere al sia "kun-aŭgusto" *Galerius* (305).

Ĉiuokaze Konstanteno strebis al tiu en Gallio, eble vokite de sia patro ĝuste tiam ekvelonta el la haveno de *Gessoriacum* (la nuna Bulonjo) trans la Manikan Kanalon al Britujo. Tie ambaŭ multe bridis kelkajn britajn tribojn, la piktojn kaj la skotojn, kiuj loĝis en Kaledonio. La feliĉa kunesto de la patro kaj filo finiĝis baldaŭ: *Constantius* I-a *Chlorus* mortis (en *Eburacum*, la nuna *York*, la 25-an de julio 306).

Kiu nun estis sekvonta kiel "imperiestro-aŭgusto" – ĉu Konstanteno? Liaj legioj, bazitaj en Britujo, ja proklamis lin. Sed samtempe en Romo aperis *Maxentius*, filo de la maljuna *Maximianus*, ankaŭ neglekte preterlasata en 305 kiel tetrarko, kaj zorgis pri sia proklamado al imperiestro-aŭgusto.

Kredeble estas imageble, ke du regantoj kaŭzis kverelon, kaj ĥaoson verŝajne nun sole regos. Sed eĉ tri regantoj ekzistis: *Galerius* samreganta kun *Constantius*. Ankaŭ kvara enmiksiĝis, la maljuna

Maximianus, la patro de *Maxentius* – kaj bopatro de Konstanteno: lia filino *Fausta* fariĝis en 307 la edzino de Konstanteno. Okaze de la nupto, la eks-aŭgusto *Maximianus* agnoskis sian bofilon kiel aŭguston.

Tiu regaĉado finiĝis ĉe la konferenco de *Carnuntum* sur Danubo, la hodiaŭa *St.Petronell* ĉe *Haimburg*, Aŭstrujo (308). Intrige kaj serĉante profiton, *Maximianus* instigis Dioklecianon, gvidi la konferencon al bona fino. Kaj tiu efektivigis, ke Konstanteno rezignis je la digno "aŭgustus" kaj kontentiĝis per la titolo "cezaro". Dua "aŭgusto", krom *Galerius*, fariĝis *Licinius* (*Valerius Licinianus Licinius*).

Eraras tiu, kiu pensas, ke Konstanteno vere kontentiĝis. Jam en 306 post la morto de sia patro li agis ordigante en Gallio. Certe li sole ĝermanojn venkis, kruele mortigis en la amfiteatro de *Augusta Treverorum*, sed montriĝis el tio, kiujn kapablojn li evoluigis por atingi firman celon, kiu estis: fariĝi unusola imperiestro-aŭgusto. Sed kontraŭuloj malhelpis lin. La unua estis lia bopatro *Maximianus*: prenante la purpuran mantelon, li pretendis potencon malrajtan, ĝis Konstanteno lin malliberigis kaj devigis al mortopuno; per sufokiĝo la hororiganto finiĝis (310).

La tetrarkio peco post peco komencis disfali, kiam Konstanteno fiksis sian atenton al *Maxentius*, okupante Hispanujon, kie tiu regis (310), kaj *Galerius* mortis sekvajare (majo de 311 en Nikodemio). Ĉar unuflanke *Licinius* ne disponis pri la potenciloj, sekvi lin kiel aŭgusto, kaj aliflanke *Maxentius* kiel ĉiama intriganto urĝe estis likvidenda, la situacio formiĝis tiel, ke la pasinta antaŭtetrarkia monarĥia sistemo povis realiĝi.

Evidente Konstanteno estos la realiganto; li ne estis malhelpebla. Verŝajne tion antaŭvidante, *Galerius* dekretis nur kelkajn tagojn antaŭ sia morto, ke ĉiuj malfacilaĵoj per mallibero kaj konfisko, direktitaj kontraŭ la kristanoj, forfalu (en *Sardica*, aprilo de 311)

Intertempe ekestis tute nova situacio. Ĉar la persekutado de la kristanoj montriĝis senefika kaj ties pozicio firmiĝis. Tion eluzante, la malsana imperiestro agis, antaŭ ol Konstanteno aŭ *Licinius* alproksimiĝis al la kristana eklezio. Sed vane li faris tiun paŝon. Unue *Licinius* inklinis al la kristanoj, kiuj en la orienta regnoparto estis pli multaj ol en la aliaj regionoj de la Imperio. Tamen Konstanteno, superrigardante la situacion, ne estis superruzebla. Li planis konforme, kaj *Licinius* asociiĝis kun li, pli nevole ol vole.

2. La venko ĉe *Pons Milvius* kaj ties sekvoj

Do, paciĝis la oriento per *Licinius*, aganta racie. Sed la okcidenta parto ne trovis pacon, ĉar *Maxentius* malaprobis la aŭgustecon de Konstanteno. Ties statuojn en Romo li renversis kaj detruis. Perforte nun Konstanteno agis kontraŭ *Maxentius*, la obstinan. De nordo li transpaŝis Alpojn, atakis kaj venkis diversajn urbojn en la pada ebenaĵo (*Gallia cisalpina*), celante al Romo.

Militis en la ebenaĵo, nun okupata de Konstanteno, la generaloj de *Maxentius*, en la ĉefurbo li mem atendis sian kontraŭulon. Sed la batalo ne aranĝiĝis en la urbo, bone gardata kaj prizorgita per nutraĵo. *Maxentius* marŝis antaŭen en la norda direkto laŭ la *Tiber*-rivero, je tri romiaj mejloj al ponto nomata *Milva* (lat. *Pons Milvius*), por renkonti la rivalon Konstanteno kun 170 000 piedirantaj soldatoj kaj 18 mil rajdistoj. Je tia amasa truparo la batalo ne povis malsukcesi des pli multe, ĉar la aŭspicioj – do, la *haruspicoj* – prognozis katastrofan finon de Konstanteno.

Rakontiĝas, ke ankaŭ tiu pridemandis la providencon, sed tute alimaniere. En la vespero antaŭ la batalo li rigardis el sia tendo kaj vidis meze de la vesperruĝo krucosignon, kaj sonĝis ke Jesuo Kristo aperas al li kaj diras la vortojn: "Sub tiu signo de la kruco vi venkos". Poste Konstanteno ordonis al siaj legianoj pentri krucon kun kurbigita dekstra trabo (X) sur la ŝildoj.

Fakte li jam delonge inklinis al kristaneco laŭ familia tradicio. Eble li antaŭvidis, ke la kristanismo estonte ĉiujn aliajn religiojn eklipsos, inkluzive la romian. Ankaŭ fakte multaj liaj militistoj jam kredis al Jesuo Kristo kaj prefere pentris la kristan krucon kun la du literoj X kaj P sur siaj ŝildoj, cele al distingiĝo de la armeo de *Maxentius*.

Tiel – do, sub la kristana kruco – alproksimiĝis la mateno: estis la 28-a de oktobro 312, kiam *Maxentius*, spirite jam venkinte, transiris la riveron, por repagi al la konstantena truparo pro ilia aŭdaca orgojlo. Sed ĉio disvolviĝis tute alie: la rajdistoj de Konstanteno atakas forte la liniojn malamikajn ke tiuj disrompiĝas; ĉiuj sin turnas al fuĝo; la rivero ondoŝvelinta pro la aŭtunaj pluvoj baras ilin; la ponto ne povas porti la fuĝantan amason; multe da konfuzaj cedantoj falas de sur la ponto en la torenton kaj dronas; apartenas al ili ankaŭ *Maxentius*, perdante gloron kaj la vivon.

Gloron sole Konstanteno rikoltis, kiu envicigis al sia armeo la reston de la venkitoj. Ne plu li havis konkuranton. *Licinius* kunpaciĝis,

almenaŭ kelkajn jarojn ambaŭ regis kune. Montriĝis la amikecaj rilatoj, kiam ili kunvenis en *Mediolanum*, kie Konstanteno edzinigis sian fratinon *Constantia* kun *Licinius* en la jaro 313, kaj proklamis per tiu edikto, kiu reguligis la staton de la kristanoj en la Romia Imperio.

Tiu edikto, ĝenerale nomata tolerema, eminentiĝis estonte, ĉar ĝi liberigis la kristanojn unu fojon por ĉiam de ĉiu ajn subpremo kaj malpermeso. Ĝi tekstis jene, ke ĉiu povas elekti la religion, kiu plaĉas al li. Do, la kristanismo estis tolerata kaj aprobata, kvankam Konstanteno mem plu fidelis al la romia panteono, kies supera sacerdoto (*pontifex maximus*) li oficis samkiel liaj imperiestraj antaŭuloj.

Teorie – tien direktiĝas la moderna demokratia aspekto – ĉiu romiano rajtis adori ian diaĵon, persone ŝatatan de li. Sed neniel tiam religia libereco ekzistis. Sole religia tradicio destinis la distingiĝintajn diajn potencojn de ĝermanoj, galloj, egiptoj k.t.p. El ili reliefiĝis unuavice la romia religio – ĝi estis la ŝtate observata, eble miksite iomete kun la grekaj diaro kaj filozofio; ĉiuj aliaj submetiĝis kaj malgravis.

Duavice reliefiĝis la kristana konfeskomunumo, la eklezio. Ĝi organiziĝis jam antaŭ ol Diokleciano provis perforte elimini ĝin, kaj konsistis el diversaj administrejoj sin mem regantaj en episkopejoj resp. paroĥoj, etendiĝantaj sur la tuta imperio. Eĉ la kruela diokleciana persekutado ne povis detrui tian ampleksiĝantan, universalan administraci-diaĵon.

Detale la edikto favoras la kristanojn jene: ili rajtas publike kaj senĝene adori sian Dion kaj ties filon Jesuo Kristo kie kaj kiel ajn; senprokraste ordinaraj kristanoj, klerikuloj, predikantoj enprizonigitaj estas liberigataj kaj povas fari siajn religiajn devojn; la bonhavaĵo, konfiskita dum la diokleciana persekutado estas redonenda, ankaŭ se temas pri donacoj inkluzive de preĝejoj, domoj de episkopoj.

Kvankam el ĉio rezultas, kiom forte Konstanteno identiĝas kun la kristanismo, tamen li neniam konfesas sin ĝia ano. Verŝajne lia intenco direktiĝis, kunigi ĉiujn tendencojn al unusola dio – ĉu al Mitrao, ĉu al nevenkebla "sundio" ("*sol invictus*"), ĉu al diversaj dipatroj naciaj, aŭ eĉ al la kreinto-dio, patro de Jesuo Kristo. Kaj post kiam la kristanismo venkis, li intencis fortpugne unuigi ĉiujn kristanajn skolojn diverĝantajn. Starante mem ekster la kristana komunumo, li sentis sin destinata – laŭ sia imperiestra digno – krei unuecan, universalan eklezion (greklingve: "katolikan").

Kiel Konstanteno konceptis la staton de tiu nova "*katholika*" instalaĵo, montris du pluaj aktivaĵoj, faritaj de li kiel fundamentoj de la posta eklezio: Laŭleĝe enkondukiĝis dum la jaro 321 la dimanĉo; tiam ĉiu ajn laboro estis malpermesita krom vere urĝa kampara aŭ karitata. Pri la grandparte nekristana enloĝantaro akceptiĝis ĝenerale la nomo "sundio", memore al la nevenkebla "dio de la suno". La kristanoj ĝin nomis dekomence "Tago de la Sinjoro" (lat. *dies dominicus*). Ĝi anstataŭis la judan sabaton. Due: en la jaroj 312/313 Konstanteno donacis al la roma episkopo la palacon de imperiestrino *Fausta*, la "Lateranon"; ankaŭ la baziliko-preĝejo apude staranta ekestis je tiu tempo. Evidentiĝas, ke Konstanteno donis specialan rolon al la episkopo de Romo.

Por ke tiu povu ludi la rolon de "estro" (aŭ "patro" = lat. "*papa*", t.e. esperantlingve "papo") de la ekkreskanta katolika eklezio, Konstanteno ĝuste tiam ekŝancis forigi eneklezian batalon, tiel nomatan skismon. Kaj nome en la provinco Afriko (*Africa*) jam de kelke da tempo la enloĝantaro disduiĝis inter la indiĝena, kampara parto de la berberoj kaj la romurbanoj. La origine sociala problemo ŝanĝiĝis al eklezia, kiam en Kartago du episkopoj estis elektitaj samtempe. Unu el ili, *Donatus Magnus*, radikaliĝis por reformi la afrikan eklezion, dum la alia episkopo, pure katolika, rifuzis kunlabori. Do, malpaciĝis ambaŭ konfespartioj: la anoj de *Donatus Magnus*, la "donatistoj", insistis pri sia koncepto, kvankam la alia, katolika partio, subtenate de la imperiestro, provis allogi kaj kaŝe subjugigi ĝin. Eĉ sinodo, kunvokita de Konstanteno en Arlezo (*Arles*) en la jaro 314, ne kapablis akordigi la donatistojn al ĝia ĝenerala doktrino, tiel ke li koncedis al ilia movado nerezistebla.

Malkonformas tiu sinteno al la ege regema imperiestro, kiu strebis al imperia unueco. Kial li koncedis? Ĉu li laciĝis? Neniel! Eble li ne klare vidis la doktrinan kvereladon. Sed verŝajne alia skismo, tiam ekestanta kaj skuanta la kristanismon, ekscitis lin pli forte, ĉar ĝi endanĝerigis la fundamenton de la juna disvolviĝanta eklezio.

Dum la donatista skismo limiĝis plejparte al la provinco Afriko – aliaj regionoj apenaŭ estis tuŝataj – la alia skismo disvastiĝis tra la tuta antikva mondo, ekprenata de la kristaneca spirito. Do, temis pri la persono de Jesuo Kristo, la resurektinto. Ĝenerale la kristanoj sin tenis al la doktrino, ke Jesuo Kristo estas la filo de Dio post sia ĉieliro, do identigebla kun Dio kaj adorebla: li ja estis esence sama kun sia Dia patro.

Ĝuste tiam kleriko en Aleksandrio, *Arius*, ekpredikis, ke Jesuo Kristo ne samrangas kun sia Dia patro, sed sole similas al li. Sagace *Arius* apologiis sian novan doktrinon, apogante sin je la kreospirito, laŭ kiu ekde komence la mondo devenis de la Kreinto-Dio. Do, ankaŭ Jesuo Kristo estas submetigebla al la Dia kreopovo. Tial li certe staras inter Dio kaj la homaro, sed diaj kapablecoj ne destinas lian esencon.

Kredeble la plej multaj klerikoj malaprobis tian novan kredkoncepton; ĉefe la samurba diakono *Athanasius* kaj episkopo *Aleksandro* kontraŭis lin kaj malaprobis tiun erarigan ekzegezon. Fakte kaj elfunde *Arius* ne kapablis renversi la prosperantan eklezion, sed kaj Aleksandro kaj *Arius* malbagateligis la aferon pli forte ol ĝi meritis, per sinodo aranĝita en 321, kie partoprenis la episkopoj de Egiptio kaj Libio. Finiĝis la kunveno, eksigante kaj anatemante *Arius*-on. Tamen ne finiĝis la spirita kverelo, ĉar episkopo *Eŭsebius* de Nikomedia prenis partion de *Arius*. Tiel pligrandiĝis la doktrina kverelado, kiu nun montriĝis kiel disduiĝo inter *Nikomedia* kaj Aleksandrio des pli multe, ĉar alia sinodo, farita en *Nikomedia*, konsentis kun *Arius*, kiu nun gajnis famon nemerite.

Nedaŭrigebla kaj neinda stato evoluis, netolerebla por Konstanteno, kiu intencis majstri la tutan eklezian instalaĵon. Nesperta je teologiaĵoj kaj kred-aferoj, li bezonis konsulton, kaj nome unue de tiu *Eŭsebius*, kiu celis influi la imperiestron favore al la "arianismo", do la doktrino de *Arius*. Sed tiam alia kleriko, episkopo *Hosius* de Kordovo (*Corduba*) en Hispanio, intrigetis kune kun la aleksandria episkopo Aleksandro, tiel ke Konstanteno konfuzetiĝis, ne sciante kiu pravas: ĉu *Arius*, ĉu *Athanasius*. Do, kraŝis unu kontraŭ alia, la arianismo kaj la katolika doktrino, reprezentata de *Athanasius*.

Nun ne erarigite, Konstanteno kaptis la okazon ĉe la kapo kaj montris, kiu estas la majstro de la domo, kunvokante ĝeneralan koncilion, kiu decidu pri la ĝusta doktrino resp. kred-konfeso. Tiun koncilion li ordonis okazigi en "Nikeo" (*Nicæa*, turke nun: *Iznik*) proksime de *Nikomedia* en *Bithynia*. Ne sole li atendis, ke klerikoj faros decidon favore al la ĝusta katolika konfeso, prilaborata de *Athanasius*, sed ankaŭ li povis konatiĝi kun la tuta klerikaro, kiu regis la eklezion. Krome li povis pruvi, kiomgrade lia aŭtoritato imponos al ili, elradianta de lia pompa grandiozeco.

Kiam en junio 325 la koncilio kunvenis, ĝi nombris 318 episkopojn, plejparte venintajn el la orientaj provincoj de la Imperio; la

okcidentajn provincojn reprezentis nur tre malmultaj episkopoj. La episkopo de Romo *Silvester* sendis sole du duarangajn sacerdotojn (presbiterojn) kiel delegitojn.

Kiam la granda amaso de la apostoldevenuloj "girlande dekoracite" estis kolektiĝintaj kvazaŭ atendante duan pentekostan miraklon, kaj kiam granda eskorto de laikoj, certe nespertaj sed apologiemaj, estis aperintaj, Konstanteno Aŭgusto inaŭguris la sinodon kiel "dian kunvenon".

Li mem, plenvestita per purpuro, oro kaj juveloj, elradiis ĉielan pompon, kvazaŭ li estis "anĝelo sendita de Dio", kiel la kronikisto Eŭsebio de Cezareo notis. Tamen la imperiestro ne kontentiĝis debuti per sia moŝta majesteco, sed lanĉante li insistis ke la koncilianoj konsentu kune kun li, kontraŭi al la aranismo kaj omaĝi al Jesuo Kristo, la vera filo de la kreinto "kiu sidas ĉe la dekstra flanko de Dio", kiel esprimas tiu fundiĝanta kred-konfeso de Nikeo.

Do, la fino de tiu grava koncilio ne decidiĝis sekve de la disputado, kiun *Arius* kaj *Athanasius* faris, sed laŭ la aŭtoritata vorto kaj voĉo de la imperiestro: tiu ne provis persvadi la nedecidemulojn kaj hezitemulojn – li ne kapablis, manke de scio kaj disputa arto – sed klarigis al ili la avantaĝojn kaj sian favoron, se ili sin submetos al lia volo. Finiĝis tiu lia postulo, kiam li insistis pri la esprimo dubebla "*Homousios*" (egale al "Dio") kiu estis enmetenda en la koncilia formulo, kvankam la majoritato ne intencis tion fari. Sed nun ĝi cedis kontraŭ sia origina konfesoteksto.

Tamen du episkopoj rifuzis sian subskribon al tiu teksto, eble farita obstine: *Theonas* de *Marmarica* kaj *Secundus* de *Ptolemaïs*. Ambaŭ estis eksoficigitaj kaj ekzilitaj. Saman sorton episkopo Eŭsebio de Nikomedio havis, ĉar li rifuzis subskribon sur suplementa teksto, ke li kondamnas sian iaman adeptecon al *Arius*. Ankaŭ la episkopo de Nikeo, *Theognis*, devis cedi pri sia areanisma adepteco. Ili devis ekziliĝi al Gallio. *Arius*, la instiganto de la herezio, trovis ekzillokon en la provinco Ilirio.

Nekontesteble la unuiĝo de la eklezio fariĝis per la potenco de imperiestro Konstanteno; jam per tio li meritis la epiteton "La Granda". Li pacigis la romian imperion, forigante la unuan skismon.

Malgraŭ tio la arianismo ne tute malaperis. Ĝi postvivis cent jarojn, kiam invadis la ĝermanaj triboj de ostrogotoj kaj vandaloj, konfesantaj al ĝi.

3. La absoluta reganto super imperio kaj eklezio

La sukceso de la koncilio de Nikeo estis unu afero, per kiu Konstanteno gloriĝis. La alia afero koncernas la duan imperiestron *Licinius*, ĝis nun konatan kiel kunreganto. Tamen, ne sole ne plaĉis al Konstanteno, kiu strebis al sola regno, sed ankaŭ *Licinius* same celis, do forigi Konstantenon.

Licinius trovis amikon kaj parencon en *Bassius*, kiu estis preta murdi Konstantenon. Malkovro de la komploto, sekve de kiu *Bassius* estis ekzekutita, komencis nehaltigeblan militon inter *Licinius* kaj Konstanteno. Jam la unua batalo inter ambaŭ armeoj, okazinta ĉe *Sibalis* en Slavonio, favoris Konstantenon, venkantan malgraŭ pli granda truparo de lia kontraŭulo.

Orgojlo instigis *Licinius*-on proklami detronigon de Konstanteno, ĉar sufiĉe da potenco ankoraŭ avantaĝis lin, kaj substitui tiun per oficiro, nomita *Valens*, al "aŭgusto". Tiel sekvis dua batalo en *Tracio* ĉe *Campus Mardiensis* (314), finiĝinta nedecidite, el kiu rezultis armistico inter *Licinius* kaj Konstanteno. La tutan provincon Ilirio krom *Tracio*, *Licinius* cedis al Konstanteno. Kvankam tiu interkonsento aspektis kvazaŭ daŭra paco, *Licinius* pretigis sian finvenkon.

Alie ol perforte kaj permilite li renversis sian sintenon kontraŭ la kristanaro en sia imperia parto. Denove – je la tria fojo – li persekutis ĉion, kio odoris kristanece (321) kaj zorgis pri la mitrakulto: servante al tiu li donis al sia soldataro specialan preĝon *Summus Deus* (adorado de la plej alta sun-dio). Tiamaniere li spekulis, ke Konstanteno perdos popularecon ĉe la loĝantaro iom post iom, neglektante ties antikvan roman religion.

Pri tio, *Lucinius* eraris. Konstanteno agis atenteme rilate al la religieco de siaj romiaj subuloj. Nek devige nek konvinke li serĉis konduki ilin al la kristaneco. Kiel liaj antaŭuloj tiel li sacerdotiĝis laŭ la malnova kredo: la titolo *Pontifex maximus* (plej alta sacerdoto) restis sankta afero por li – almenaŭ por la plej granda parto de la popolo.

Tamen la eklezion li protektis kiel eble plej forte, malamikojn li ne volis kaj ne serĉis: li strebis al pli alta celo. Al tiu li alproksimiĝus, se *Licinius* provokus lin militiri. Tio okazis dum bagatelaĵo, kiam Konstanteno invadis lian teritorion, deturnante ĝermanajn tribojn minacantajn la imperion.

Licinius pretekstis tion por deklari militon. Li disponis pri armeo bonarmita, konsistanta el 350 ŝipoj kaj 165 000 legianoj. Konstan-

teno havis sole iom pli ol 200 ŝipojn kaj komandis 130 000 legianojn. Proksime de *Hadrianopolis* (turke hodiaŭ: *Edirne*) *Licinius* formis fortikan pozicion. Tiun Konstanteno atakis (la 3-an de julio 323) plenvenke. Lia filo *Crispus* same agis kun la ŝiparo en la markolo, ĉe la enirejo de "Helesponto" (nuna: *Gallipoli*); la reston de la malamika ŝiparo pereigis ventego. Fine Konstanteno sieĝis la markolan urbon *Byzantium*, tiel ke *Licinius* devis fuĝi al la azia bordo. Sed energie kaj pene li kolektis refoje 130 000 soldatojn kaj direktis batalon al la postsekvinta Konstanteno ĉe la urbo *Chrysopolis* (hodiaŭ turke *Üsküdar*), situanta kontraŭe de *Byzantium* je la orienta bordo de la markolo. Tie decidiĝis la sorto de *Licinius*, ĉar la batalo finiĝis katastrofe por li, eble nur 30 000 soldatoj postvivis. La urboj *Byzantium* kaj *Kalcedono* sin donis en la manojn de Konstanteno (324).

Vidante sian malvenkegon, *Licinius* petis pardonon, eble pere de sia edzino *Constantia*, la fratino de Konstanteno. Unue tiu indulgis lin, montrante al li la urbon *Thessaloniki* kiel loĝlokon. Sed poste Konstanteno ŝanĝis sian agmanieron kaj kondamnis la iaman aliancanon al morto, eble por eviti ties restariĝon kontraŭ li.

Konstanteno nun estis absoluta aŭtokrato, ne plu ekzistis iu, kiu povis deŝiri la potencon de li. Nun post kiam la granda imperio regiĝis laŭ lia volo, li ankaŭ obstiniĝis pri la eklezio, unuigonta la tutan Romian Imperion, kiel okazis dum la koncilio de Nikeo.

Aspektis kvazaŭ ekstera afero, per kiu politiko kaj religio resp. kristanismo identiĝas en la persono de Konstanteno, tamen malfaciliĝis tia sintenado, kiam la retrorigardo al lia ekrego, aparte al la granda batalo ĉe "*pons milvius*" ne sole permesas, sed eĉ postulas alian koncepton – do, ke li ŝoviĝas en la centron de novaĵo, kristaliĝanta per la kristana doktrino. Li, kiu perceptis evidente de sia patrino *Helena* tiun doktrinon, ne povis vivi en du mondoj – en la malnova romia kulturo kaj en la ekestinta kristaneco – kaj formis novan mondkoncepton, stampitan de la kristanismo.

Eble sole familia tradicio envicigas lin en rolon, reliefigitan de trajtoj tutkristanaj. Ekzemple la antaŭsignoj, profetantaj al la granda venko, kaj la stranga simbolo "X" desegnita sur la soldataj ŝildoj, aludas lian konfeson kristanan kaj cementas la legendon, pentrantan la venkon impresan por la ponto.

Do, sen troigo asertiĝis, ke Konstanteno konvertiĝis al kristaneco, kreskinta jam dum lia juna aĝo, kiam li estis proklamita imperiestro. Certe saĝe li komence kaŝis tion, sed per la edikto de *Mediolanum*

la unuan fojon li ne plu tenis siajn porkristanajn sentojn en sekreto. Kiel ĉiu klerulo, ĉiu oficisto aŭ politikulo konsciiĝis, ke tolerata kristanismo signifos ties finvenkon, tiel ankaŭ Konstanteno mem klare vidis tiun tendencon.

Sole li distingiĝis de ĉiuj siaj konsilianoj kaj ĉirkaŭuloj, ke li nek malaprobis, nek volis forigi la novan, eksciteman religion, sed li provis akordigi ĝin al la romiaj kulturo kaj tradicio. Eĉ li penis – laŭ tio la eminenta politikulo pruvis sian sagacon trans jarcentoj kaj por si poreterne – servigi la kristanaron forme de la eklezio, ĝenerale akceptita, greke (*koinè*) esprimita katolika, al sia politika celaro. Tamen publike Konstanteno ne konfesis al ĝi, sed restis por la simplaj civitanoj tio, kio diriĝas latine "*Romanus sum* (mi estas romiano)". Kontraŭ la dia origino de la imperiestreco li tute ne agis.

Kontraŭas al tia vere romia justec-konfeso kiamaniere li reformis kaj prosperigis la kristanismon kaj eklezion. La episkopojn, ĝenerale ĉiujn klerikojn, Konstanteno petis dekrete, observi imperiajn devojn. Precipe la jurisdikcio apartenis al tiuj devoj. Pli kaj pli kristanaj kutimoj kaj opinioj publikiĝis: la sanktigado de la resurektanta tago, lige kun la malpermeso de publika kaj profitdona laboro, la malpermeso brulvundi ŝtatajn punkaptitojn en minejoj laborantajn, restrikto de la kruelaj gladiatoraj spektakloj kaj tiel plu.

En ĉiuj ĉi tiuj aferoj Konstanteno ja montriĝis aŭtokrate, respondece ankaŭ kiel "*pontifex maximus*" super la eklezio, tamen impresiĝas laŭ la skribaĵoj al la episkopoj, ke li malakceptis regotitolon, ĉiam li nomis sin "humila servisto de la eklezio kaj de Jesuo Kristo" aŭ "amiko de la kristanaro kaj protektanto de sia amata kristanismo".

Vidante sin kiel samepiskopon de la veraj servistoj de Dio, li ne hezitis zorgi pri la unueco de la eklezio, subpremante ĉion, kio kontraŭdirektas, kio devias. Pli kaj pli per severeco li gardas la ortodoksan, puran doktrinon; episkopojn deviantajn li mem kondamnis kaj ekzilis. Ĝuste kiel jam la nikea sinodo anatemis tiujn, kiuj ne konsentis kun ĝi – vere kun sia propra decido, ankaŭ poste aliaj klerikoj elposteniĝis. Eĉ virojn kiel *Athanasius*, kiu prezentis lian opinion dum Nikeo, li devigis al tia eksiĝo – tiun la sinodo en *Tyrus*, dekretita de Konstanteno, kondamnis (335).

Do, unuflanke la imperiestro zorgis pri sia eklezio, ŝatata kaj observata de li kiel savo de la romia mondo – eble tro frue identigata de li kun la tuta imperio, aliflanke li ne povis malligiĝi de la imperia politiko, realeco kaj idealo, observenda de li.

Laŭ tiu ĉi principo li konsideris plej alte, daŭrigi sian propran dinastion, do zorgi pri siaj idoj, regokapablaj kaj plenvirtaj, ke ili restados fidelaj kaj al la romia heredaĵo kaj al la nova religia instalaĵo, la katolika eklezio.

Jen tragika sorto trafis lian unuanaskitan filon *Crispus*, devenantan el la unua edzeco kun *Minervina*, la konkubino. Dum la militiroj kun *Licinius* li distingiĝis. Post la honorigo patra per la cezarigo en la jaro 317 en *Augusta Treverorum* ekestis suspekto, ke li malĉaste rilatas kun sia duonpatrino *Fausta*, kaj Konstaneno ordonis lian murdon pervenene. Verŝajne la imperiestro baldaŭ eksciis, ke tiun fifaman agon inside instigis lia edzino, kaj tial ankaŭ *Fausta* devis morti – ŝi sufokiĝis ŝvitbaniĝante, ankaŭ en la jaro 326. Ofte tian agadon ne nur liaj samtempuloj, sed ankaŭ la postvivantoj imputis al li kiel nerespondecan kruelaĵon, ne akordigeblan kun lia netuŝebla aŭtoritato.

Sed konsidere al la romia imperiestra kulturo tio ne elstaras. Jam dum jarcentoj antaŭe murdoj ĉe la kortego ne eksterordiĝis. Sango makulegis ofte ĉiujn ajn kortegajn eventojn, tie Konstanteno esceptiĝis nur malmulte.

Pli reliefe kaj tutŝanĝe Konstanteno nun post la sang-agado direktis sin orienten; Jerusalemo kaj Palestino estis sanktaj lokoj por veraj kristanoj, dekoraciindaj per preĝejoj, pilgrime strebindaj por piaj romiaj kristanoj. Kiel oni kronu ĝin? Ĉu la imperiestro tie serĉu novan centron? Ĉiuokaze Konstanteno deturnis sin de la eterna, honorinda centro Romo, serĉante novan centron: en la oriento, kie la homoj pli respekteme adoris Jesuon Kriston ol en la okcidento, ne jam bone plenigita de la kristana spirito.

4. La finaj agadoj kaj la morto

Transloki la imperian centrejon el okcidento en la orientajn regionojn, tia ideo jam de longe la imperiestrajn imagojn okupis; ĝi rezultis el la plej diversaj kaŭzoj – eble la percepto, ke la orienta kulturo superas la okcidentan romian, eble ke la greka helenismo kovis spirite la universalan, imperian potencon.

Decide kaŭzis tiun tendencon tute alia eventaro, tipe romia drapirado de la historio kaj mito, laŭ kiu la unuaj romianoj eskapis el Trojo aŭ Iliono post la terura milito, kiun la greka poeto Homero priskribis en sia epopeo Iliado, kaj fondis Romon.

Reveni al tiu sankta loko do jam Cezaro kaj Cezaro Aŭgusto vidis sia devo, ordonita de la dioj. Plenumi tiun agadon Konstanteno sentis sin destinita. Post kiam la urboj Tesaloniko, *Sardica* kaj Kalcedono vekis lian intencon, li fine decidiĝis al la praaĝa sanktejo de Iliono. Tien li vojaĝis kaj serĉis la tombon de Ajakso, granda heroo de la Troja Milito, kie oni oferis al la antikvaj dioj ekde ne plu scieblaj tempoj.

Tiu heroejo estis preferata, de la dioj destinita, fondi la novan urbon. Konstanteno enfosigis la konturojn, la pordegoj jam elstariĝis, kiam iunokte Dio aperis kaj admonis lin serĉi alian lokon. Nun Konstanteno decidiĝis pri Bizanco, greka urbeto ĉe la kontraŭe situanta bordo de la maro, ĉe la markolo nomata Bosporo. La fundamentan ŝtonon li metis la 26-an de novembro 326. Metiistojn el la tuta imperio li ordonis konstrui la urbon pli bela ol la malnova Romo. Ili ekipu ĝin per palacoj, temploj kaj preĝejoj, brilantaj en marmoro. Riĉulojn kaj eminentulojn la imperiestro igis ekloĝi. Dekoracie li ne ŝparis starigi bustojn sur kolonoj laŭlonge de larĝaj bulvardoj: el Egiptio multajn kolosajn statuojn aŭ monumentojn oni altransportis por impresigi la novan urbon glorioze kaj gigante. Porfira kolono, plej granda peco el Egiptio, cent futojn alta, proviziĝis al la statuo de la urbofondinto Konstanteno.

Apenaŭ kvar jaroj estis pasintaj; la nova urbo gloriĝis plenpompe kaj inaŭguriĝis kadre de mirakle belegaj cirkoludoj la 11-an de majo 330. Laŭ la fondinto Konstanteno, simbolanta kaj prezentanta ĝin, akceptiĝis ĝia tute nova nomo: *Konstantinopolis* aŭ "Konstantinopolo" (t.e. "urbo de Konstanteno").

Krom la multaj memoraĵoj, rilatantaj al li, la imperiestro dekretis la ĉiujaran datrevenon de la inaŭgurotago kiel ĉiaman elmontradon de li: granda orumita statuo de li, ekleviĝanta sur la dekstra polmo tendiĝanta de *Tyche*, kiu estis la protekta genio de la urbo, veturis tra la granda stadiono, eskortita de torĉistaro, majeste kaj glorioze aspektanta. Tiam la respektiva imperiestro devis ekstari el sia remburita seĝo kaj terenĵetiĝi genuflekse antaŭ la bildoj de Konstanteno kaj la genio *Tyche*.

Ekde tia tempo, komenciĝanta ĉe la dua ĉefurbo, ĵus fondita, la maljuniĝinta imperiestro kaptis du konceptojn, gravajn pro la estonteco. La unua koncepto cirkulis ĉirkaŭ lia patrino *Helena*, kiu asistis kaj konsilis lin: precipe ŝi influis lin favori la kristaniĝon. Ŝi mem pilgrimis al sanktaj lokoj en la Sankta Lando Palestino; laŭ legendo ŝi

kunportis najlon el la kruco sur kiu la Savinto Jesuo Kristo mortis. Grandaĝe ŝi mortis nur mallonge antaŭ ŝia filo Konstanteno. La urbo *Drepanum*, situanta en *Bithynia*, ricevis alian nomon: *Helenopolis*, tie konstruiĝis martira preĝejo – ankaŭ honore al la imperiestra patrino.

Krom sia patrino, Konstanteno havis ankaŭ grandan parencaron, ne nur de filoj sed ankaŭ de nevoj, per kiuj li volis reguligi la heredovicon post sia morto. Li volis ne nur kontentigi ilin, sed ankaŭ firmigi sian dinastion.

Firmvole Konstanteno intencis kombini la heredrajtan, dinastian kaj tetrarkian sistemon, kiam li destinis sekvi lin la filojn de siaj fratoj *Dalmatius* kaj *Julius Constantinus*. Jam dum sia regado li observis, ke ĉiam kvar posteuloj – ĝuste kiel Diokleciano instalis – staras sub lia regno, kaj nome: *Dalmatius*, filo de lia frato samnoma, fariĝis cezaro en la jaro 335, reganta en la grekaj teritorioj; la propraj filoj Konstanteno II-a, *Constantius* II-a kaj *Constans* regis la aliajn romiajn partojn laŭ la diokleciana sistemo. (Fraton de *Dalmatius*, *Hanibalianus*, li investis en kromlando *Pontus-Armenio*; la filoj de la frato *Iulius Constantius*, *Gallus* kaj *Iulianus*, estis ankoraŭ infanoj.)

Tiamaniere liginte la nodon de sia regnado, Konstanteno preparis lastfoje entreprenon: romian potencon li volis prezenti permilite al la persa reĝo *Ŝapur*, kiu minacis la imperion. Sed la milito ne plu okazis. Dum la planado la imperiestro malsaniĝis forte. Sentante sian adiaŭon de la surtera mondo, li preparis ion tute alian: Pacon li serĉis kun tio, kio tuŝis lian koron fervorege, la konfeso al la kristanismo. Nun la konvertiĝon li instigis. Li kateĥumenis en la martira preĝejo de *Helenopolis* kaj translokiĝis proksime al Nikodemio, en sia vilao *Achyrona*. Mallonge antaŭ pentekosto la baptadon li akceptis, la duan pentekostan festotagon siajn manojn imperiestro Konstanteno transdonis al Jesuo Kristo kaj al la eklezio (la 22-an de majo 337). La lastan restadejon li trovis en Konstantinopolo en sia maŭzoleo, konstruita apud la apostola preĝejo.

Malgraŭ ĉiu penado kaj klopodado la deziroj de Konstanteno ne plenumiĝis: Paco sub la ĉielo ne ekestis; mallonge post lia morto la novaj regantoj disiĝis. *Dalmatius*-on la legionaro ne agnoskis, kaj dum la sekvinta ĥaoso li perdis sian vivon same kiel lia frato *Hanibalianus* kaj lia patro *Dalmatius*. La filoj de Konstanteno postvivis, plej longe *Constantius* II-a, mortinta en la jaro 361.

La alia strebado, per kiu la imperiestro malfermis novan epokon, la etendiĝado de la kristaneco, komence nur floretis. Dum la imperiestreco de lia nevo *Iulianus* ĝi ŝajnis preme enanguliĝi, ĉar li intencis instali novan religion, kvankam romian tamen unudian, pro kio li alnomiĝaĉis "*Apostata*" (t.e. perfidanta kontraŭ la eklezio).

Certe *Iulianus* regis sole du jarojn (361-363), milito kontraŭ la persoj postulis lian vivon, tamen la kristanaro kaj la katolika eklezio pli kaj pli insiste penetriĝis en civitanaro, politikistoj kaj eĉ meze de la imperiestra kortego. Definitive la venko de la eklezio evidentiĝis, kiam imperiestro *Theodosius* I-a dekretis la eklezion la sola ŝtata religio, malpermesante la konfeson al la romiaj kaj grekaj dioj (381).

C. Epilogo – postefikoj kaj aprezado – kritikado

Kiam oni volas enordigi la imperiestron "Konstanteno I-a la Granda", inter la plej-eminentuloj de la historio, li meritas duoblan honorigon. Sendube li ne sole reformis la Romian Imperion, sed ankaŭ li fondis tute novan socian institucion: la papan rom-katolikan eklezion.

Malgraŭ siaj meritoj antaŭ la homa socio, li komprenebliĝas nur kiam oni rigardas lin kiel kombinanton kaj unuiganton de ĉi tiuj du sferoj de religiaĵoj kaj politikaĵoj. Ne senkaŭze li portas la alnomon "la Granda". La romia historiografio metas lin ĉe la flanko de Cezaro Aŭgusto aŭ Cezaro (*Gaius Iulius Cæsar*). Krome la eklezia historiografio ne povas ne meti lin ĉe la komenco de sia eklezia instalaĵo.

Tial, pridemandante lian agadon surbaze de la tiamaj tendencoj, oni malkovras kaj la originon kaj la finpunkton de lia grandeco. Parte profete, parte rezulte de siaj sendubaj kristanaj klereco kaj eduko, li ekkonis, ke la estonteco apartenos al la ekevoluanta dia doktrino de Jesuo Kristo, travidante ke ties komunumo vivas kaj ekzistas laŭ liaj vortoj: "Kaj jen mi estas kun vi ĉiujn tagojn ĝis la maturiĝo de la mondaĝo" (Mateo 28, 20), spertante ties potencon – antaŭ kaj dum la batalo ĉe *Pons Milvius* – senhalte li progresis efektivigi la regnon de la kristana komunumo.

Tamen, li agis singarde, ne lezante la piecon de siaj subuloj; precipe la kamparanoj daŭre fidis al siaj multspecaj dioj. Li mem observadis siajn imperiestrajn devojn, hereditajn de la antaŭulo. Eble tial li ne baptiĝis ĝis li konsciiĝis pri la neŝanĝebla sorto de mortideva homo.

Certe oni ne eraras, kiam liaj grandeco kaj sagaco enviciĝas sur la politika nivelo. Unue, grave la imperio lin streĉis kaj lia religieco devis enordiĝi. Ekkoni la kadukecon de la iam fiera romia imperio, bazita sur multspeca sed putreca panteono, tio estis lia akra sperto. Tiun staton, estigitan de ĝiaj kulturaj kaj religiaj valoroj, pli kaj pli, li povis substitui danke al la kristanismo. Ne sole ties doktrino fascinis lin, pli multe la organizadon kaj administracion de la eklezio li admiris, kaj paŝon post paŝo li realigis ĝian integriĝon al la ŝtato.

Ankaŭ post la morto de Konstanteno la eklezio solidiĝis pli kaj pli, aparte de la interrompo pere de lia nevo *Iulianus Apostata*, tiel, ke la titolo "imperiestro" (*Cæsar et Augustus*) implicis la patronecon super la papa eklezio dum la mezepoka tempo, ĝis la titolo nuliĝis sekve de kelkcentaj jaroj kaj la papeco memstariĝis malkovrante la mankojn kaj malfacilaĵojn de la mondumo.

La regno, renovigita de Konstanteno, bazita sur la katolika eklezio, dume ŝanĝiĝis. La okcidenta parto malaperis, post kiam imperiestro *Theodosius* I-a disduigis la imperion al siaj filoj *Honorius* kaj *Arcadius* (395), kaj kiam la okcidenta imperio disfalis al diversaj ŝtatoj (Francio, Italio, Hispanio ktp.), tamen la orienta parto, regata de la nove fondita urbo Konstantinopolo, persistis pli ol mil jarojn kontraŭ la plej danĝeraj malamikoj, ĝis la osmanaj turkoj sturmis la bastionon (29-an de majo 1453), farante ĝin la ĉefurbo de ilia imperio.

Malgraŭ ĉiuj gravaj faroj – aŭ priekleziaj aŭ priromiaj – Konstanteno alternas je la konceptoj de la historiografio. Laŭ tio kiel originas la historiistoj, ili inklinas rezigni pri vera karakterizado. Ilia aprezado malaperas malantaŭ la grandioza persona fenomeno.

Senvole oni serĉas diferencon inter la politika geniulo kaj la fidema kristano. Nerifuteble Konstanteno evitas tian klaran imagaĵon. Fine la imagaĵo pri li nek distaŭziĝas nek nebuliĝas, kvankam tiom multe da tempo pasis ekde kiam li ekskuis sian mondon.

Cetere iuj historiistoj kondamnas lin kiel kristanan hipokritulon, kiu uzis la eklezion sole por atingi siajn ambiciajn politikajn celojn, dum aliaj omaĝas aŭ omaĝis – unuavice lia fama biografo Eŭsebio, episkopo de *Cæsarea* – al li kiel sanktulo kaj fondinto de la romiakatolika eklezio, kiu apogis ĝin iel ajn. Sendube Konstanteno staris ĉe la sojlo de nova historia erao; estis pasinta la grandioza antikva kulturo; baziĝanta sur ĝi formiĝis la mezepoka kristanismo, iniciatita de li kiel la unua kristana romia imperiestro.

Glosaro

Actium : havenurbo, landstrio kaj promontoro, elire de la Ambraka Golfo en la Iona Maro, situanta en la meza Grekujo.

Africa / Afriko : Provinco de la Romia Imperio; dum la regno de Konstanteno ĝi estis nur malgranda parto de la nuna Tunizio (*Africa Proconsularis*) ĉirkaŭ *Carthago*. La nomon la provinco prenis de tribo indiĝena, nomata *Afri* (afroj). Multe pli poste la nomo transiris al la tuta kontinteno.

Aŭgustus : Honora nomo de G.I.Cezaro Oktaviano, dediĉita al li de la senato 27 a.K. signifanta lian dian devenon kiel sublima majesto. Ĉiuj postaj imperiestroj aldonis la titolon al siaj propraj nomoj.

Bithynia : Regiono kaj provinco de la Romia Imperio, situanta en Malgranda Azio vid-al-vide de Konstantinopolo kaj la provinco *Tracio* (vd. malsupre).

Bosporo : Markolo, liganta la Nigran kaj la Marmaran Marojn, apartiganta Eŭropon de Azio (Malgranda Azio, Anatolio). La nomo signifas: vadejo de (vir)bovo.

Dekalogo : La t.n. "dek ordonoj", kiujn Moseo, la fondinto de la hebrea (vd. malsupre) religio akceptis de Dio Jehovo sur la monto *Horeb* de la *Sinai*-Montaro, ĉizitaj sur ŝtonplatoj. La judoj traktis ilin kiel sanktaĵon. Por la kristanoj ili validas kiel bazo de ilia doktrino.

Etruskoj : Memstara popolo kun propra kulturo, vivinta en la meza Italujo (de la 7-a ĝis la 4-a jarcento a.K.). Iliaj reĝoj de la dinastio de la Tarkvinioj (vd. malsupre) regis super la urbo Romo. Tiu memstariĝis, dum la 3-a jarcento a.K. la etruska regno finiĝis kaj almembriĝis al la Romia Imperio.

Eusebius de Cezarea : Tiu erudito, vivanta proksimume inter 290 kaj 341, estis ne nur episkopo de *Cezarea* (*Kaisareia*), sed ankaŭ historiisto. La unua "Eklezia historio" originas de li, kaj li verkis ankaŭ biografion pri imperiestro Konstanteno kiel samtempulo. Singarde interpretebla ĝi abundas je piaj trajtoj kaj faktoj. Eŭsebio kiel plenfida kristano rigardas la imperiestron laŭ la kristana vidpunkto.

Ĝermanio : Male al la historia nocio Germanio/Germanujo la historia scienco determinas tiujn ĝermanojn kvazaŭ ties antaŭulojn, sed pli vaste. Ĝermanaj popoloj ekestigas Germanujon, sed ne inverse. En Eŭropo diversaj ŝtatoj devenas ĝermane, ekz. Danujo, Svedujo, Norvegujo. En la roma tempo unuopaj ĝermanaj popoloj minacis la imperion, eĉ invadante, ekz. la cimbroj, teŭtonoj, ostrogotoj, visigotoj.

Hebreoj : Antikva popolo, longtempe loĝanta en Palestino, post kiam ili vivis, eble mallibere, en Egiptio, de kie Moseo kondukis ilin for sub la emblemo de unusola Dio Jehovo. Dum la postaj tempoj la hebreoj alinomiĝis: izraeloj kaj judoj.

Haruspicoj (= **haruspekso**) : La antikvaj romianoj havis moron kaj kutimon, demandi la sorton antaŭ ol ili komencis gravaĵon. Tiamaniere ili agis aŭspiciante: sacerdoto buĉis bovon kaj metis el la ventro la viscerojn. Laŭ la situo aŭ formo de la intestoj la sacerdoto determinas la ekestontan aferon, ĉu ĝi finiĝos bone, aŭ ĉu oni povas timi sinistran rezulton.

Helenismo : Spirita kaj lingva ekspansio en la orienta mediteranea regiono baziĝanta sur greka kulturo kaj civilizacio, ekde kiam Aleksandro la Granda fondis tie sian regnon (ĉ. 330 a.K.). La greka lingvo, nomata "*koinè*" (vd. malsupre), ligis la diversajn naciojn.

Imperatoro : Titolo, ofte de soldatoj aklame atribuita al venkhava generalo, por agnoski ties plej altan potencon en la Romia Imperio; laŭ potenco kaj jura grado samsignifa kun Cezaro kaj imperiestro Cezaro Aŭgusto. Maljam la Diokleciana tetrarkio (vd. malsupre) distingis inter ambaŭ titoloj Cezaro kaj Aŭgusto.

Iulia (familio) : Patricia roma gento resp. familio, fama pro siaj diktatoroj Cezaro kaj Aŭgusto.

Ilirio : Roma regiono resp. provinco, situanta sur la balkana duoninsulo, nomata *Illyricum* laŭ diversaj antikvaj popoloj, do kolektivo.

Koinè : Uzata komuna lingvo de la orienta Mediteraneo kiel ligilo inter la diversaj ŝtatoj resp. kulturejoj, baziĝanta sur la helenismo (vd. supre), do ĝi estis la greka lingvo, tie uzata de la plej multaj enloĝantoj, precipe de politikuloj kaj eruditoj.

Komunio (aŭ **eŭkaristio**) : Memore al la 'komuna' vespermanĝo de Jesuo kun siaj disĉiploj je la vespero antaŭ sia kondamno kaj krucumado. El tiu manĝado, esprimanta per la rompado de pano kaj la trinkado de vino la korpon kaj la sangon de la Savinto Jesuo ĉeesta, evoluis parto de la kristana liturgio, ne plu estanta manĝado. Laŭ la Lutera doktrino la Savinto Jesuo ĉeestas dum la pastro disdonas panon kaj vinon al la kreduloj. La rom-katolika komunumo kredas, ke dum la disdono la pano kaj vino transformiĝas al la korpo kaj sango de Jesuo, sin oferanta, kiu nomiĝas "eŭkaristio".

Kredkonfeso de Nikeo / Niceo : Evoluis dum la longa historio de la kristana eklezio diversaj eldiroj, interpretantaj kaj decidantaj la doktrinon, nomataj "kredoj" laŭ la tekstkomenco "*credo*" (t.e. mi kredas). En ili mallonge manifestiĝas la "kanono", kiu determinas la enhavon de la kristana doktrino. Jam tiel frue formiĝis la "apostola kredkonfeso" kaj la "Nikea kredokonfeso" de 325, influate kaj instigite de imperiestro Konstanteno. Ili ambaŭ konsistas el tri partoj (laŭ la Sankta Triunueco de patro, filo kaj sankta spirito).

Mesio. Jesuo Kristo la - : Hebrea nocio resp. nomo, signifanta: la unktito. Laŭ la hebrea religio – tiel la profetoj instruas – tiu devenos el la familio de reĝo Davido kaj savos la hebrean, judan popolon el mallibereco; ankoraŭ nun la popolo atendas lin. Sed la kristanoj pretendas, ke Jesuo el Nazareto

estas tiu Savanto, kiu liberigas ĉiujn homojn (ne sole la judojn) de malbono kaj peko per sia morto sur la kruco. La hebrea vorto "mesio" tradukiĝas en la koina lingvo (vd. supre) *christos* (χριστός).

Mitrao : Persa dio, tamen de la antikva persa religio de Zoroastro (Zaratuŝtro) subpremata, nur akceptata dum la 1-a jarcento a.K. Poste li konkursis kun la kristanismo. Li reprezentis sunon kaj lumon kiel nevenkeblan diaĵon. Inter la legianoj li estis adorata. Evoluis speciala kulto, farata en subteraj volbaĵoj.

Nikomedio (alie *Nikomedeia*) : ĉe la "Proponto" (alia bordo kaj golfo de la Helesponto), ĉefurbo de *Bithynia* (vd. supre). Tertremoj detruis ofte la urbon, hodiaŭ ĝi nomiĝas *Izmit*.

Osmanaj turkoj : Nomo de la turkoj kaj de ilia ŝtato (ĝis 1922) laŭ la regantaj princoj, titolitaj "sultanoj". Tiu dinastio, fondita de sultano Osmano I-a *Ghasi* ĉ. 1300, nomis sian ŝtaton "Osmania Imperio", larĝe etendiĝantan sur la orienta Eŭropo kaj orienta regiono mediteranea. La kerno estis la turkoj, kies nuna ŝtato situas en Malgrand-Azio (Anatolio) kaj malgrandparte en Eŭropo ĉirkaŭ Istanbulo.

Principato / princepso : Ŝtata konstitucio, kreata de Cezaro Aŭgusto, kiu determiniĝis de reĝo aŭ diktatoro (= tirano, aŭtokrato) tiel range, ke la plej alta potenco aŭ aŭtoritato implicis ŝtatan rangon de unua civitano, responsanta al la senato. Por si mem, Cezaro Aŭgusto elektis la titolon "*princeps*", per kio li esprimis sian civitanan samrajtecon. Tamen kiel plej alta oficisto, ekipita per ĉiuj ŝtataj potencoj kaj rajtoj, li prezentis kumule ĉiujn publikajn oficojn, transdonitajn de la senato al li laŭ lia reputacio.

Pada ebenaĵo : Sole geografia nomo de la granda ebenaĵo norditala inter la montaroj Alpoj kaj Apeninoj, trafluata de la riverego Pado. Dum la romia erao ĝi estis la provinco "*Gallia cisalpina*", ĉar tie ĉe la ĉi-flanka deklivo de Alpoj vivis gallaj (keltaj) triboj.

Pontus-Armenio : Romia provinco, situanta ĉe la bordo de Malgranda Azio, direktita al la Nigra Maro. *Pontus* estas la nomo de montaro (aŭ eble laŭ "ποντος" = "nigra maro"), *Armenio* estas nomo de popolo kaj ŝtato. Certe ĝi estis limregiono.

Respublika epoko : Dum la romia historio ĝi limiĝas de la reĝa epoko, kiam la lasta reĝo *Lucius Tarquinius Superbus* estis forpelita (510 a.K.) ĝis la fino de la Intercivitana Milito, farata de Cezaro (*G. Iulius Cæsar*) en la jaroj 46/45 a.K. Post Cezaro kaj kun Cezaro Aŭgusto sekvas la "imperiestra erao". La "respublika epoko" implicas du instancojn: 1. la Senato kiel decidpovo, 2. multfaceta oficistaro, kiu zorgas ke la senataj decidoj plenumiĝas. Plej alte funkcias kaj reprezentas la du konsuloj, ĉiujare elektataj.

Sankta Paŭlo : Kristana apostolo kaj misiisto el juda gento, origine nomata Saŭlo. Ĉu vere antaŭ la konverto li persekutis kristanojn, dubiĝas kaj fabeliĝas. Sed la misiaj vojaĝoj aŭtentiĝas, ne sole laŭ la epistoloj aŭ la historiaĵo

pri la apostoloj "La Agoj", sed ankaŭ laŭ aliaj skribaĵoj. Tamen lia morto dum la regado de Nerono ne estas tute garantiata, same kiel la fino de apostolo Petro, kiu inverse estis krucumita, sed ne kredeble.

Tetrarkio : Kion Diokleciano inventis ne estis novaĵo, sed li transprenis tiun regnosistemon de la grekoj, kiuj uzis ĝin en Tesalio, norda regiono, dividita en kvar rekrutigejojn. Dum la tempo helenisma (vd. supre) aliaj regionoj, eble en Anatolio, tiel dividiĝis. Plej konate Palestino regiĝis tiamaniere, post kiam Herodo (de Judeo) mortfiniĝis. Liaj heredantoj nomiĝis tetrarkoj. Mire sed ne prave Diokleciano uzis tiun herodan sistemon, tamen modifita.

Theodosius I-a : Romia imperiestro (reg. 379-396). Li reliefiĝis el la romiaj regantoj antaŭ li per jenaj agoj: ĝenerala enkonduko de la kristana konfeso kiel oficiala religio (381), disduigo de la imperio post sia morto al la filoj: *Arcadius* fariĝis imperiestro en la orienta parto, rezidanta en Konstantinopolo; *Honorius* regis en la okcidento, kie la malnova Romo restis la ĉefurbo.

Tago de la Sinjoro : Jam dekomence kiam la eklezio ekestis kaj fundamentiĝis, la unua tago de la semajno fariĝis festotago memore al la resurekto de Jesuo Kristo. Du nomoj kutimiĝis en la diversaj provincoj de la imperio: "Tago de la suno" – t.e. angle "*Sunday*", germane "*Sonntag*", aŭ "Tago de la Sinjoro" (lat.: *dies dominicus*) – franclingve "*dimanche*" kaj Esperante "*dimanĉo*".

Tracio : Regiono de la Balkana duoninsulo, situanta proksime de *Istambul* / Konstantinopolo. Soleca parto de Turkujo, troviĝanta sur la eŭropa kontinento. Origina skribmanerio: *Thrakio* laŭ la greka gento, la "thrakoj".

Troja Milito : Ĉirkaŭ la urbo Trojo (*Troja*) ĉe la orienta bordo de la Marmara Maro volviĝas la granda mito (kiel la grekoj konkeris la fortreson post dekjara sieĝo, detruis ĝin) ĝis la germana arĥeologo *Heinrich Schliemann* elfosis ĝin en 1880/90. Dum la antikva erao la epopeo "Iliado" (laŭ la greka nomo *Ilion* por la urbo) rakontis la bataladon pri ĝi, verkita de la granda poeto Homero, vivinta en la 9-a jarcento a.K. Eble vere la milito okazis en la dua jarmilo antaŭ Kristo.

X kaj P. La literoj - : Tiuj estas grekaj literoj. Ili konformas al la latinaj "*CH*" (Esperante: ĥ) kaj "*R*". Per ili skribiĝas dekomence la Savinto Jesuo Kristo per la alnomo *Christos* (greke *ΧΡΙΣΤΟΣ*).

Zeŭso : La plej alta kaj grava dio de la greka panteono; tial li nomiĝas "diopatro". Multaj temploj, konstruitaj honore al li, atestas tiun rangon. Plej fame tio montriĝas je la templo de *Olimpia* kaj la sportludoj, okazintaj post po kvar jaroj. Ekde 776 a.K. ili estas atestataj, ĝis *Theodosius* I-a (vd. supre) malpermesis ilin en la jaro 394.

Kronologio

Jaro	Dato	Okazintaĵo
274		Naskiĝo de Konstanteno en *Naissus* (*Niŝ*)
293	1-a de marto	Ekfunkciado de la diokleciana tetrarkio
303	23-a februaro	Kruela persekutado de la kristanoj, ordonita de Diokleciano
305	1-a de marto	Ŝanĝo en la tetrarkio: *Galerius* kaj *Constantius Chlorus* fariĝas "aŭgustoj"; *Severus* kaj *Maxentius Daja* fariĝas "cezaroj"
306	25-a de julio	Morto de imperiestro *Constantius* II-a *Chlorus* en *Eburacum* kiel "aŭgustus", proklamo de lia filo *Constantinus* (Konstanteno) kiel "cezaro" de siaj trupoj
311	Aprilo	Tolerema edikto favore al la kristanoj de imperiestro *Galerius*
312	28-a oktobro	Konstanteno venkas kontraŭ *Maxentius* ĉe *Ponto Milva*
312		Li donacas la palacon "Laterano" (apartenantan al lia edzino *Fausta*) al la eklezio
313		Kune kun *Licinius* li proklamas la edikton tolereman de *Mediolanum* favore al la kristanoj
323		La bataloj de *Hadrianopolis* kaj *Chrysopolis* kontraŭ *Licinius*, kiu estas venkita kaj kondamnita al morto
325	Junio	Koncilio de Niceo (Nikeo) malfermita de imperiestro Konstanteno
326		Murdo de *Crispus* (filo) kaj de *Fausta* (edzino) de Konstanteno
326	26-a de nov.	Fondo de Konstantinopolo
330	11-a de majo	Inaŭguro de Konstantinopolo
337	22-a de majo	Morto de Konstanteno la Granda

Literaturaĵo

Burckhardt Jacob: *Die Zeit Konstantins des Großen* (La tempo de Konstanteno la Granda).

Danielou J. & Marrou H.I. (eld): *Geschichte der Kirche Bd.1 "Von der Gründung der Kirche bis zu Gregor dem Großen"* (Historio de la eklezio, vol. 1 "Ekde la fondiĝo de la eklezio ĝis Gregoro la Granda".

Daniel-Rops Henry: *L'Eglise des Apotres et des Martyrs* (La eklezio je la tempo de la apostoloj kaj martiroj).

Kraft H. (eld): *Konstantin der Große – Wege der Forschung, Vol. VXXXI.* (Konstanteno la Granda – Vojoj de Esplorado, vol. VXXXI).

Rostovzeff M.: *Geschichte der Alten Welt, 2. Bd., Rom.* (Historio de la Antikva Mondo, 2-a vol., Romo.

Seyfarth W.: *Römische Geschichte – Kaiserzeit. Bd.2.* (Romia Historio – imperiestra epoko, dua vol.).

Wilken Robert L.: *The early Christians, as the Romans saw them.* (La frutempaj kristanoj, kiel ilin vidis la romianoj).

Adreso de la aŭtoro (†)

troviĝas en SR 1/2006, fine de la unua parto de tiu ĉi artikolo.

Priaŭtora informo kaj nekrologo

La aŭtoro estis emerita instruisto. Ekde 1960 li forte engaĝiĝis pri historio, partoprenis sciencajn kursojn kaj poste televidan kurson de la Frankfurta Universitato. En 1978 li komencis verki lokajn historiaĵojn, kiuj instigis lin, verki historiajn skizojn. Pro siaj meritoj s-ro *Kalkhof* estis honorigita per stratnomo en la komunumo *Ilbeshausen-Hochwaldhausen*, kie li instruis....

... la supra „priaŭtora informo" venis per letero datita 17.01.2006, sendita al mia malnova adreso (jam 6 jarojn ne plu valida) kaj mi ricevis ĝin nur post la forpaso de la skribinto. Kvazaŭ profete nun legiĝas la vortoj, ke "...urĝas finpretigi la prilaboron de mia historiaĵo pri Konstantino/Konstanteno la Granda. Certe mi konsentas pri la ŝanĝoj, faritaj de vi retpoŝte. Pri la skribado de la nomo mi kunsentas kun vi, kvankam mia pripensado urĝas min al mia propra opinio...".

Dufoje "urĝas". Iom pli poste "por ke la afero ne prokrastiĝu, do bonvolu procedi kiel vi planas". „La apudan tekston pri „-in" bonvolu preni en vian koron – mi suspektas, ke historiaj aferoj estas ne bone regataj eĉ de eruditaj esperantistoj...". Jes, mi laŭpete procedis, metis la historiaĵon en du partojn (ĉar 42-paĝa artikolo por 52-paĝa revuo estas tro longa kontribuo) kaj publikigis la "pri-*in*-an" opinion legantleterforme.

La funebran sciigon, ke s-ro *Gerhard Kalkhof* mortis la 16-an de februaro 2006, mi ricevis antaŭ ol la supra letero atingis min. La 24-an de januaro nia fidela amiko festis sian 80-jariĝon en malgranda familia rondo – pli granda solenado estis planita post 4 semajnoj...

Sed la morto venis senanonce – tamen amikece. Matene de la 16-a de februaro s-ro *Kalkhof* sentis sin malbonfarta, kaj lia edzino iris al la apudaĉambra telefono por voki la ambulancon. Kiam ŝi revenis, ŝia edzo jam estis pace forpasinta.

ISAE perdas fidelan membron, Scienca Revuo perdas unu el siaj maloftaj aŭtoroj de historiaĵoj. UEA perdas aktivan Delegiton, Esperanto perdas entuziasman disĉiplon de la Internacia Lingvo kaj lia hejmurbo perdas jam per stratnomo honorigitan loĝanton. Kaj la familio perdas sian ŝatatan kaj amatan familiestron.

La estraro de ISAE kaj la redakcio de Scienca Revuo funebras kun la vidvino kaj ties 4 infanoj kaj 2 genepoj. *(Prof. d-ro R. Sachs)*

Antimateria koncepto de duonkonduktanto

Eizo OTSUKA

Resumo

La lastatempa laboratoria kreado de antihidrogen-atomo faris dramecan atingon en la antimateria komponado. Ne reala antimaterio, sed tamen ĝia ekvivalento estas jam longe traktita en la fiziko de duonkonduktantoj. Dinamiko, kiu implikas antimateriajn partiklojn, estas tute simile demonstraciata en duonkonduktantoj rilate al elektronoj, truoj, ekscitonoj, donantoj, akceptantoj kaj iliaj kombinoj. La koncepto de antimaterio en duonkonduktantoj ŝajnas bone bazita kaj pli ol sukcesa en la analiza fiziko.

Enkonduko

La ekzisto de antimaterio estas unue profetita (de *Dirac*) kiel "truo en la vakuo post ellaso de elektrona partiklo". Tiu truo estis nomata "pozitrono", kiu estas ŝargita pluse (dume elektrono estas foje nomata "negatrono", en kontrasto al pozitrono).

La *Coulomb*-asocio de pozitrono kun elektrono produktis la koncepton de pozitronia atomo, aŭ simple pozitronio, kun la simbolo Ps, kiu estas analoga al hidrogen-atomo kun protono anstataŭinta la pozitronon. La lig-energio estas duon-*Rydberg*, aŭ 6,8 eV, pro efiko de reduktita maso. La aktuala formado de pozitronia atomo estas instigita en rara gaso kaj stabile atingita en silika-gelatenaĵo. Kelkaj fundamentaj kvantumaj energi-niveloj, same kiel iliaj fajnaj strukturoj, estas vere konfirmitaj tra la procedo de pozitronio-formado el metalsurfaco. Sed la dinamiko de la elementa procedo, kiu implicas Ps-atomon (ekz. elektron-kapto aŭ pozitron-disigo de Ps) estas observita neniam tiom longe kiom scias la aŭtoro.